

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1977 5

KULTURAJ KAJEROJ

1977 SEPTEMBRO-OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Revoj kaj sonĝoj pri Esperantujo M. Delcourt
J. Amouroux

Islando : antikva Tuleo

Mistera famulo : Grafo de Saint-Germain E. Motillon

Dektri I. Orkeny
trad. I. Nagy

La 2a letero de Mihai Eminesku trad. P. Teodoresku

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

El Grésillon

Responde al la petoj de multaj eksterlandanoj ni ĉijare « elterigis » la grezijonan internacian diplomon. Ĝi estis sukcesa, kaj ni intencas daŭrigi tiun novan provon.

Iom da « historio » : antaŭ proksimume dekkin jaroj la instruo-komisiono de Gresillon decidis krei internacian ekzamenon. La Franca Esperanto-Instituto organizas kvin diversnivelajn ekzamenojn kiujn oni povas trapasi en Gresillon. Ankaŭ eksterlandanoj deziris ekzameniĝi. Ili ne povis pro tio ke en ĉiu ekzameno ekzistas tradukprovoj. Oni rimarkigis al ni, ke ne ekzistis internacia diplomo ; la UEA-ekzameno estis kreita nur poste kaj je tre alta nivelo. Ni provis ekzamenon, kies provoj konsistis el demandoj pri studita libro, pri la lingvo, pri la movado kaj pri gramatiko. Dum tri jaroj ricevis la diplomon pli ol dek esperantistoj. Tiu diplomo certigas, ke la akceptito kapablas lerte praktiki la lingvon skribe kaj parole. Sed ĉar ni ne ricevis la petitan aprobon ni rezignis. Ni verŝajne eraris.

Jam de pluraj jaroj amikoj pli kaj pli insiste petis nin organizi denove tian ekzamenon. Ĉijare ni decidis starigi ne unu sed du : la Internacian Ateston pri elementa lingvoscio, la Internacian Ateston pri Praktika Lingvoscio. Se necese ni venontjare organizos trian pli altnivelan (supera lingvoscio aŭ instrukapablo). Kompreneble ĉiuj provoj okazas nur en esperanto. En julio dudek kvin personoj de tri landoj provis la unuan ekzamenon kaj unu la duan. Ni intencas pli precize studi la diversajn erojn de la ekzamenoj por adapti ilin al la certigotaj kapabloj. Speciala komisiono okupiĝos pri tio. Sed ĉiukaze ni ne intencas organizi kursojn celantajn sukcesan trapason de tiuj ekzamenoj. Kursoj devas celi akiron de kapabloj ne akiron de diplomo. La diplomo devas poste kaj eventuale certigi ian lingvonivelon sed ne atentan ĉeeston en trisemajna kurso.

Pri tiuj diplomoj ni ŝatus ricevi rimarkojn.

Esperanto tra la Mondo

La Universala Kongreso en Rejkjaviko

Pli ol 1000 geesperantistoj el kvardeko da landoj partoprenis la universalan kongreson en Islando.

La persona ĉeesto, dum la solena inaŭguro, de la ĝenerala direktoro de UNESKO, S-ro Amadou-Mahtar M'Bow, estas la plej grava kaj signifa evento por la tuta esperanto-movado.

Espereble, tiu ĉeesto instigos ĉiujn esperantistojn, individue, al dekobligita agado, ĉar estas kuraĝiga defio !

Ĉeestis ankaŭ S-ro Kristjan Eldjarn, la ŝtatprezidento de Islando kaj la kulturministro Hjalmarsson, kiu parolis en Esperanto, kaj multaj eminentuloj kaj diplomatoj.

Okazis la kutimaj eroj de la jaraj kongresoj, ĝeneralaj kunvenoj de U.E.A., komitataj kunvenoj, somera universitato, fakaj kunvenoj, kulturaj kaj distraj vesperoj, ekskursoj, belartaj konkursoj, ktp...

La kongresa rezolucio substrekas la gravecon de la lingva aspekto de la komunikado (temo de la kongreso).

Kiel sciate, la universala kongreso 1978 okazos en Varna (Bulgario), de la 29a de Julio ĝis la 5a de Aŭgusto.

La kongresejo funkcios en la salonoj de la Palaco de Sporto kaj Kulturo, tre proksime al la marbordo.

La junulara kongreso en Poitiers

300 gejunuloj kunvenis en Poitiers, de la 9a ĝis la 16a de Aŭgusto por la kongreso de TEJO. Se la distraj eroj ne mankis, kiel konvenas en junulara renkonto, evidentiĝas ke la kongreso estis ankaŭ laborema se oni konsideras la longan liston de la laborgrupoj kaj diskutitaj demandoj. La komitato de TEJO akceptis novan statuton kaj la nova prezidanto estas Savas Tsiturides (Greko).

La teatra trupo TESPA el Parizo prezentis « La Justuloj » de Albert Camus, kaj estis solene atribuita la premio « Verko de la Jaro 1976 » por la libro : « ĉu vi kuiras ĉine? » de Johan Valano (Claude Piron).

La prezidanto de U.E.A., Humphrey Tonkin, ĉeestis parton de la kongreso kies fina rezolucio atentigas pri la neceseco kunlabori kun UNESKO kaj, interalie, « alvokas la atenton al pripenso pri la rolo kiun la lingva demando ludas rilate la rajtojn de la popoloj, nome, ke la lingva kaj kultura subpremadoj estas iloj de imperiismo ».

La kongreso 1978 ankaŭ okazos en Bulgario.

SAT-kongreso en Aŭgsburgo

Ankaŭ 300 kongresanoj el 18 landoj partoprenis la kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda en Aŭgsburgo (F. R. Germanio) dum Julio.

Ĉi-tie ankaŭ, la pariza esperanto-teatro TESPA prezentis « La Justuloj ».

La fina rezolucio rememorigas la celojn de la Asocio : « peresperanta organizo, kies rolo estas antaŭ ĉio helpi al realigo de la klasaj celoj de la laboristaro kaj konstanta plialtigo de ĝia kulturnivelo ».

La venonta SAT-kongreso okazos en Julio 1978 (16-22) en Lectour (Francio).

De nun, notu, krome, por 1978

— Franca nacia kongreso, 12-16 de Majo (Pentekosto), en Clermont-Ferrand. Sekretario : S-ro R. Melo, 34 ave, de Russie, F-03700 Bellerive-sur-Allier.

— Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno (... ankaŭ por ne fervojistoj !), en Grainau, ĉe Garmisch-Partenkirchen (Germanujo), 11a — 18a de Februaro. Informas : J. Weidacher, Scheefinkenweg 11, D — 8000, München 82.

— Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, 27a de Decembro — 3a de Januaro, en Rotenburg, ĉe la rivero Fulda.

— Internacia Fervojista kongreso, en Romo, 13 — 20a de Majo.

— Someraj Universitataj Kursoj 78, en Centro Dumont, universitato de Liège (Belgujo), 6 — 27a de Aŭgusto, sed ĉiu semajno estos en simem kompleta unuo.

Temoj : Astronomio, Psikologio, Internacia literaturo. Partopreno-kondiĉoj : abiturienteco aŭ samnivela klereco. Kelkaj stipendioj por studentoj. Adreso : someraj universitataj kursoj, BP 9, B-4000 Liège X (Belgujo).

— Paska Junulara Renkonto, 24 — 27a de Marto, en Nederlando. Adreso : N.E.J., Coranthijnestraat 75, NL — 8003, Groningen, Nederlando.

— Internacia Labortendaro por gejunuloj, en Israelo, 2 semajnojn dum Julio. Adreso : Moše Ben-Porat, Hašomer 6, Givatajim, Israelo.

Post la morto de Jean Rostand

Post la morto de la fama franca scientisto Jean Rostand, konvenas memori ke li estis granda amiko de Esperanto. Li akceptis ke pluraj el liaj verkoj estu tradukitaj en la internacia lingvo, kaj interalie skribis, en la antaŭparolo de la esperantlingva traduko de « Tio, kion mi kredas » : « Estas ne penseble ke biologiisto ne salutus fervore la ideon de universala lingvo, komuna por ĉiuj homoj... Mi esperas ke la momento ne estas tre malproksima kiam ĉiuj homoj, dank'al Esperanto, kapablos interkomunikiĝi same kiel faras, per siaj dancoj, ĉiuj abeloj... ».

Ĉu Esperanto ankaŭ registrita en « Voyager » ?

Laŭ pluraj fontoj, ni eksciis ke, inter la multaj lingvoj registritaj en la usonaj raketoj « Voyager » laste senditaj al kosmo, estus ankaŭ teksto en Esperanto. Eble ni havos baldaŭ konfirmon ?...

Por la francaj radio-amatoroj

En la kadro de la asocio de francaj radio-amatoroj (« Réseau des Emetteurs Français »), ekzistas Esperanto-grupo kies membroj rilatas kun aliaj amatoroj de multaj landoj.

La respondeculo de la grupo estas André Cuny, F8MD, 197 Ave. du Maine, 75014 Paris, kaj la sekretario : Henri Chaisnot, F9ED, 32 bis, rue Henri-Régnault, 92500 Rueil.

U.E.A. vendas radio-amatoran terminaron.

Laborkonferenco « Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo »


Sub tiu nomo, Instituto pri Kibernetika Pedagogio invitas al laborkonferenco, en lingvoj Esperanto kaj Germana, en Paderborn, Germanio, je la dato : 24 — 27a de Novembro 1977. La programo estas tre riĉa. Peti la informilon (kaj la sendadon de estontai informiloj pri konferencoj) al : Instituto pri Kibernetika Pedagogio, Postfach 1567, D-4790 Paderborn.

REVOJ KAJ SONĜOJ PRI ESPERANTUJO

« Kara Sinjoro ! Viajn du artikoletojn mi legis kun granda intereso. La ideo tre plaĉas al mi. Se ĝi povus esti plenumita ĝi estus, laŭ mia opinio, tre grava akiro por la interna ideo de la esperantismo ». Tiele skribis, la 18-an de decembro 1907, Dro Zamenhof al Gustave Roy, profesoro ĉe la liceo de Saint Girons.

Per tiu ĉi letero Dro Zamenhof aprobis la ideon de G. Roy realigi sendependan esperantistan ŝtaton sur la teritorio de la neŭtrala Moresnet.

La traktato de la 9-a de junio 1815 difinis la landlimojn de Prusio kaj Nederlando lasante parton de la urba teritorio de Moresnet al ambaŭ landoj sed kvinkilometre longa kaj 1250-metre larĝa parto de la urba teritorio Moresnet, de 1816, restis neŭtrala. La enloĝantoj estis ĉu belgaj ĉu prusaj kaj la ĉefa urbeto de tiu neŭtrala teritorio, Altenberg, konsistis el 3.000 enloĝantoj inter kiuj — laŭ aserto de G. Roy — 135 esperantistoj.



Jen idealaj kondiĉoj por fondi esperantolandon. Tamen la revo de G. Roy neniam transiris el la mondo de la sonĝoj.

Alia plano ĝermis en la kapo de homoj kies intima espero je granda monprofito certe superis ilian idealisman flankon.

La 8-an de junio 1912 sub la impulso de dresdena komercisto, Leopold Schalf, fondiĝis « Propaganda Ligo » kies celo estis krei esperantistan urbon. Dank'al la financa helpo de munkena bankiero, laŭdire favoranta Esperanton, la ligo akiris en Gräfelfing, vilaĝo je nur 5 km de la urblinio de Munkeno, terenon je 1.000.000 da kvadrataj metroj valorantan 2.000.000 da markoj. Eventuale pli da tereno estus aĉetebla se necese.

La ligo havis estraron kies plej aganta ano certe estis L. Schlaf, sekretario, kiu, kiel esperantisto, jam eldonis lernolibron kaj vortaron, starigis « Laboristan Esperanto-Ligon » el kiu li estis forpelata, en 1911, pro monprofita agado. Konsilantaro kaj Honora Konsilantaro konsistis el pompaj nomoj kaj nobelaj titoloj kaj laŭŝajne plej sekuraj teĥnikistoj.

Por financi la entreprenon kaj amortizi la ŝuldon kontraŭ la bankiero, la ligo organizis loterion kiu konsistis el 1.000.000 da biletoj vendotaj po 1 marko. La germana leĝo permesis loterion nur inter membroj de sama societo kaj tial necesis deviga aliĝo al la ligo, cetere senpaga. La ĉefa lotumota premio estis sesĉambra domo kun la plej modernaj oportunaĵoj situanta meze de parko kaj valoranta 25.000 markojn. Ceteraj lotoj estis monrepagoj de 3 ĝis 1.000 markoj. Kromaj premioj al la plej efikaj vendistoj de loteribiletoj kaj konkurso estis pliaj allogaĵoj.

La tuta plano de la entrepreno estos nomita « Parkurbo Esperanto » ĉar ĉiu aparta domo estos ĉirkaŭita de ĝardeno aŭ parko. Dekomence estis antaŭvidita la konstruo de 800 individuaj domoj kaj komunumaj konstruaĵoj : teatro, kazino, banejoj, hoteloj, ktp.. La komunaj instalaĵoj estos eventuale je la dispono de eksteraj neesperantistoj sed almenaŭ unu ano de ĉiu domposedanta familio nepre devos scipovi Esperanton. La avantaĝoj por Esperanto estis iom magraj sed pli evidentaj estis la financumaj.

La Esperanto-gazetaro ne multe bruis pri tiu tro mirinda entrepreno sed la esperantistoj kiuj, trapasante, Munkenon, vizitis la sidejon de la « Propaganda Ligo » povis propraokule konstati, tra abundaj poŝtaĵoj, la vekitan scivolemon de la tutmondaj esperantistoj kaj la dungita arĥitekto, Fritz Sievers, ĉiam fiere montris al la vizitantoj la planojn de la grandioza entrepreno.

Survoje de piedvojaĝo de Parizo ĝis Krakovo al la oka kongreso de Esperanto, la 24-an de junio 1912, la fama propagandisto kaj membro de la Lingva Komitato, Vasilij Nikolajeviĉ Devjatnin, vizitis la munkenan sidejon de la ligo kaj entuziasmiĝis pri la afero. Post la krakova kongreso li dungiĝis en Munkeno kaj baldaŭ fariĝis ties sekretario.

Sed demandoj pri seriozeco kaj efikeco por Esperanto de la tuta afero baldaŭ leviĝis kaj la ruso S. Obručev tiele finskribis raporton, en decembro 1913, pri vojaĝo tra Germanujo :

« Sinjoroj, fondu parkurbojn, nomu « Esperanto », organizu eĉ loteriojn — tio estos afero inter vi kaj la dezirantoj gajni — sed ne postulu aliĝon je la nomo de « nia sankta afero », ne parolu pri la « estonta ĉefurbo de nia karega Esperantujo » kaj ne malklarigu nian simplan kaj ne disputeblan celon per nebula revado ! ».

Tiun saĝan konsilon la esperantistoj fakte jam aplikis. La entrepreno tute fiaskis kaj, en junio 1914, V.N. Devjatnin, la ekssekretario de la « Propaganda Ligo »

atentigis : « Ni avertas ke oni ne sendu monon al la projektita Parkurbo en München. Sro Devjatnin nun opinias ke la afero ne estas fidinda ».

Certe laŭdindaj laŭ la spirito estis tiaj ideoj sed ne firmaj kaj fantaziaj la ŝanceblecoj.

La estiĝo de internaciaj esperantistaj komunumoj estus la vivanta simbolo de la esperantista popolo tia kia ĝin revis niaj pioniroj sed, finfine, Esperantujo estas la tutmonda teritorio, sen limoj. Ĉu vi neniam havis la impreson okaze de amasa internacia Esperanto-kongreso, de partopreno en la vivo de Grezijono aŭ de simpla vizito al esperantisto ke vi ne troviĝas tie aŭ tie sed vere en Esperantujo ? Tio estis nek revo nek sonĝo.


kunlabore verkis :

— Marcel DELCOURT
— Jean AMOUROUX



Ĉefgajno de l'Internacia Loterio.

En ĉiuj dek serioj
90 000 gajnoj
er. la sumo de
400 000 markoj
kaj, **krom tio,** unu ĉefgajno — belega **domo** en Parkurbo, valoranta **25 000** markojn, aŭ **20 000** markojn per mono.




Domo kun la ĝardeno, kaj en ĝi:

6 ĉambroj, antaŭĉambro, kuirejo, servistĉambro, provizejo, vestejo, banejo, necesejo, lavejo, kelo, galerio, verando, centra hejtado k. t. p.

Propaganda Ligo
Parkurbo Esperanto
GRÄFELFING- - MÜNCHEN -
(Germanujo)
8 Pfandhausstrasse 8.

Bankakontoj:
:: Ĉekbanko Esperantista ::
Bayer. Vereinsbank München.



Parkurbo Esperanto apud München. — La konstruota Kazino.

Karaj gefratoj,
antaŭen sen timo!
Gardu kuraĝon
en via animo!
Nia smeralda
standardo kun stelo
Nin alkondukos
sendube al celo!




Parto de unu el tri komercaj distriktoj.

Islando : Antikva Tuleo

Kiam Piteas kaj lia ŝipanaro revenas al Masalio, ili tute vane rakontas la mirindajn malkovrojn de sia ekspedicio. Oni ilin ne kredas. Ja, tiuj Mediteraneanoj ne povis kredi je tiuj monstraj balenoj, tiuj glaciomontoj, tiuj borealaj aŭroroj, tiuj monataj Tago kaj Nokto, tiuj nekonataj landoj, tiuj amasoj da homoj tute similaj al la aliaj.

Tamen la ŝipo de Piteas lasis sulkon en la penso de la scienculoj : Unu jarcenton pli poste Eratosteno de Aleksandrio markas sur sia mapo nordajn situojn : Ouxisame (Uesanto), la triangulo de Britujo, Ierne (Irlando), kaj ĉe ekstrema nordo, fine de ĉefa akso (kiun li pasigas laŭ la Nilo-valo), la insulo Tuleo, kun « ĝiaj tenebraj vojoj » diris Virgilio. Dum longa tempo, la raportoj de Piteas estas, por la Grekoj kaj la Romianoj, la nura informo pri la hiperboreaj teroj. Plinio diras, ke Tuleo estas la plej fora el la konataj teroj. Plutarko lokas ĝin okcidente de Britujo kaj notas la ĉi-tiean persistecon de la suno. La mapo de Ptolemeo (2-a jarcento) ĝin situas norde de la Orkadoj. Cent jarojn pli poste, Solinus precizigas, ke de la Orkadoj al Tuleo necesas vojaĝo 5-taga kaj 5-nokta. Prokopo, bizancano de la 6-a jarcento, identigas ĝin kun Skandinavio. La nordaj vojaĝantoj lokas Tuleon en diversaj lokoj : Tuleo de Uesanto, Tuleo de Albiono, Balta Tuleo, Norvega Tuleo, Tuleo de Piteas. Hodiaŭ oni trovas ĝin trans la 76°, en la Alta Groenlando. Sed la Tuleo, revita de la Antikvuloj, restas senfine neatingebla.



La Roma Imperio ruiniĝas sub la sinsekvaj batoj de la Barbaroj, kiuj venas el Azio. La popoloj, kiel sinsekvaj ondoj, kovras unuj la aliajn. Estas eksterordinara miksado de sangoj, de homoj, de teknikoj, de kredoj, de ideoj. Delfo ne plu estas la Centro de la Mondo. Siavice, Romo svenis. La esperoj turniĝis al la Galilea Krucumito.

En Britujon, el Nordo, fluegis lavango : Saksoj, Engloj rabadas, incendias, perfortas. Multaj Keltoj forfuĝas al Kornvalo kaj Kimrujo, al Armoriko, kie ili havas « kuzojn ».

La ekspedicioj de la Irlandanoj

Jam de 900 jaroj tiuj Gaeloj-Keltoj estis en Irlando. Ili estis vivintaj ekster la okcidenta mondo, ekster la Romo Ordo. Ili havis siajn proprajn problemojn, siajn reĝojn, siajn druidajn erikejojn, siajn kromlehojn, siajn feinojn, siajn revojn... ankaŭ siajn aŭdacajn navigistojn, kiuj ŝipis malproksimen, tre malproksimen.

En la 5-a jarcento, Sankta Patriko venis el la monakejo Lerins, (Cannes), kristanigis Irlandon kaj iĝis ĝia sankta Patrono. Tiam, en Irlando, la kredo estas profunda. Celante diskonigi Evangelion kaj malkovri la Kristanan Hiperboreujon, la monakoj forŝipis. Ili forŝipis, sen preciza celo, fidante la sugestojn de la Nevidebla, la kapricojn de la ventoj kaj de la fluoj. Se multaj perdiĝis en la oceanaj abismoj, aliaj, dank'al feliĉaj cirkonstancoj, atingis la bordojn de la — estonta — Ameriko. Aliaj, laŭlonginte Irlandon, portitaj de la natura drivado de la ondoj, ŝipis al bordoj de Skotlando kaj, transe, al Hebridoj, Ŝetlandoj, al Orkadoj, al Feroaj Insuloj.

En tiuj izolejoj, ili esperis, ke silento, dieto, preĝo, meditado, alproksimigas ilin al Dio. (Kiel la sanktaj Paŭlo, Gregorio, Antono, Bazilo, de Mez-Oriento). En la arktaj dezertoj, tiuj sanktaj homoj vivis en ŝtonaj kabanoj, en la nura ĉeesto de la muĝantaj ventoj, de la marbirdoj, de kelkaj ŝafoj. Kaj forgesitaj de ĉiuj.

Malnovaj muroj el ne fiksaj ŝtonoj dissemitaj en la erikejo, loknomoj, svagaj tradicioj pri homoj de Dio, kiuj kuracis kaj profetis estas tio, kio restas de tiu aspiro al Sublimeco.

Kelkaj instaliĝis en Islando kaj ĉi tie komune vivis pro la rigoro de la klimato.

La antikva irlanda literaturo prikantas tiujn ekspediciojn al Nordo, al Okcidento. La plej antikva el tiuj tekstoj « La Navigacio de Maël-Duino » priskribas la « Gigantajn forĝistojn, kiuj ĵetas, sur la ŝipistojn, masojn da ruĝa fero, kiu boligas la maron » (verŝajne, vulkana erupcio en Islando) — priskribas ankaŭ la glacimontojn : « la arĝenta kolono, kiu sta-

ras el la ondoj », « la insulo sur la pilieroj el blanka bronzo ».

Fine de la 5-a jarcento, la irlandano Brendan, de la reĝa raso de Finloch, forlasas sian abatejon, kune kun 17 monakoj. Ilia velŝipo estas el ligno kaj tegita per bova ledo. Dum 7 jaroj ili vagas en la fantasta arkta universo : glacimontoj, grandegaj balenoj, « gigantaj ŝafinoj » (moskaj bovoj). Ili preĝas ĉe la Pordoj de Infero, piede de la Islandaj ardejoj.

Ili instaliĝis en Islando.

Iun tagon, en la 9-a jarcento, la buntaj veloj de la Vikingoj elmergis el la horizonto. La pruo de la drakŝipoj, per mura impeto, enprofundiĝis en la sablon de la plaĝoj. Grandegaj knabegoj, kun armiloj, are eskaladis la klifojn. Ili troviĝis vid-al-vide kun barbaj, naivokulaj anakoretoj, vestitaj je ĉifonaĵoj kaj parolantaj nekonatan lingvon.

Teruregitaj, forlasante la manuskriptojn kaj la sonorilojn, pri kiuj parolas la sagaoj, la anakoretoj ensipiĝis. Oni ne scias, kio okazis pri ili. Post ilia foriro, la konkerantoj fandis la sonorilojn el kiuj ili fabrikis juvelojn kaj bonajn zon-bukojn.

La Vikingoj

Inter Eŭropo kaj Azio troviĝas la riverego Don. Sur ĝia orienta bordo vivis la « Ases », la bonfaremaj dioj de la Naturo, luktantaj kontraŭ la Malbonaj Fortoj. La ĉefaj dioj estis Tor, Odin, Baldr.

Tor estas dio de tondro kaj pluvo ; lia ĉaro estas tirata de 2 kaproj ; lia armilo estas la martelo Mjöllnir. Li luktas kontraŭ la Gigantoj kaj kontraŭ la Serpento Jörmungand.

Odin estas la germana Wotan (Votano) ; lia nomo signifas « furiozo «. Li estas dio de la milito sed ankaŭ dio de la Runoj kaj de la poezio. Li estas ŝamano ; liaj bestoj estas la lupo kaj la korvo ; lia ĉevalo Sleipnir havas 8 krurojn ; lia armilo estas la ĵetlanco ; li posedas la magian ringon Draupnir. Li estas unuokula. Li ricevas homajn oferbuĉojn. Kun la militistoj de sia Valhalo li luktas kontraŭ la demonoj.

Baldr (Balder = la Printempo) estas filo de Odin. Li estas la dio de la Lumo, de la Justeco, de la Beleco.

La « Ases » — popolo sekvis Odin en granda migrado al Norda Okcidento ; ĝis Balta Maro, Svedujo, Danlando (kie Odin mortis). Odin estas praulo de longa sinsekvo de reĝoj, kaj ankaŭ la ĉefa dio de la Skandinavia mitologio.

Tiu popolo, blankhaŭta, bluokula, blond-aŭ-flamhara, instaliĝis sur la marbordoj, en la insuloj, en la fjordoj de Svedujo kaj Norvegujo. Ili partigis inter si la plej bonajn terojn. Ili vivis je ĉasado, fiŝado, agrokulturo, sub aŭtoritato de militestroj.

En navigado, milito, rabado, ili estis unuarangaj. Tacito raportis pri Suiones (Svedoj) « riĉaj je armiloj kaj ŝipoj ». En tiu tempo, nur la Vikingoj sciis konstrui ŝipojn kapablajn transporti, sur la vasta oceano, grandan nombron da personoj, porvivaĵojn, materialojn, mastrumilojn, brutaron... Sen tiuj drakŝipoj, estus okazintaj nek vikingaj ekspedicioj sur la maroj, nek vikingaj reĝolandoj, nek koloniado de Islando en tiu epoko. La grandajn ĉefojn oni enterigis en siaj drakŝipoj.

La Vikingoj, Skandinaviaj militestroj, invadis la tutan Eŭropon en Mezepoko. El siaj rabadoj ili alportis predon kaj sklavojn.

Ĵus antaŭ tiuj Vikingaj ekspedicioj, Eŭropo estis elportinta la Barbarajn Invadojn. Sekve, en la 8-a jarcento, la tuta okcidento-lando, de Frizonujo al Romo, de Morbihan al Transilvanio estis pli malpli aneksita al la Karolida Imperio. Karolo la Granda senkompate estis militinta kontraŭ la Saksoj, kiuj rifuzis la Krucon kaj la Tributon. Multnombre la Saksoj rifuĝis ĉe la Nordanoj. Kelkajn jardekojn pli poste, la Imperio de Karolo la Granda diseriĝis. La eŭropaj marbordoj ne plu estis gardataj ; urboj, fekundaj teroj, riĉaj farmobienoj, abatejoj plenplenaj je trezoroj : kalikoj, relikvujoj, luksegaj ŝtofoj, estis tentantaj predoj. De longe la Vikingoj estis okupintaj la Ŝetlandojn, Orkadojn, Feroojn, Hebridojn, iĝintajn veraj piratejoj.

Inter 823 kaj 851 la drakŝipoj (kiuj mezuris de 14 ĝis 27 metroj, kaj kies pruo portis drakojn pentritajn je krudaj koloroj), atingis — post Skotlando kaj Irlando — Utrecht, Dorstadt, Hamburg, Novgorod, Southampton, Portland, Rochester, London, Anvers, Rouen, Paris, Nantes, Bordeaux, ktp...

Laŭirante la francajn bordojn, kaj inverse de Piteas, ili iris ĝis Hispanujo, kaj, transe de la Gibraltar-markolo, ĝis Provenco, Kamargo, Sicilio, Italujo, Egea Maro, Dardaneloj kaj la Maro Nigra.

Dume, svedaj Vikingoj, komercistoj pli pacemaj, trairis Rusujon laŭ la riverego kaj la lagoj. Dnjepr kondukis ilin al Maro Nigra ; Volga al Kaspia Maro ; laŭirante la Don-riveregon, ili alvenis al la Azova Maro, kie oni situis Asgard, la urbon de la Ases-dioj.

En 861 — rakontas la Landnâmabôk — forta vento puŝis la drakŝipon de Naddod inter Norvegujo kaj la Feroaj Insuloj kaj pli malproksimen al Okcidenta Nordo. Post 2-3 tagoj, li subite ekvidis montajn pintojn sur nekonata tero. Li albordiĝis apud la orientaj fjordoj. Li grimpis sur monton por vidi ĉu estas loĝantoj, sed li vidis neniun ; ĉe la aŭtunaj neĝoj li re-ensipiĝis kaj nomis tiun teron Snaeland = Neĝolando. Estas la unua nomo de Islando.

La Landnâmabôk rakontas pri alia ekspedicio : Gardar Svavarsson, svedo, ŝipis al Hebridoj, kiam uragano pelis lin al la vasta oceano. Post 2 000 kilometra kurado, li renkontis la promotoron Austurhorm. Li esploris tiun grandan insulon. Li travintris en Hûsavik (la Golfo de la Domoj) sur la norda bordo.

Lasinte paron da sklavoj sur la insulo, li revenis en Skandinavion kie li laŭdis sian malkovron. Li donis al tiu insulo sian propran nomon : Gardar-sholmi : la insulo de Gardar ; estas la dua nomo de Islando.

La Landnâmabôk precizigas, ke en tiu epoko, la insulo estis, inter maro kaj montoj, kovrata je arbaroj. Cetere la geologoj trovis fosiliajn arbojn sub la lafo-tavoloj. Ŝajnas, ke antaŭ la lasta glacia epoko, Islando havis grandajn arbarojn.

La rakonto de Gardar okazigis novan ekspedicion, kiun organizis la vikingo Flôki. Li foriras kun multa ŝipanaro, bestaro ; kun siaj du filinoj kaj tri korvoj (la birdo de Odin). La flugado de la korvoj indikas la sekvotan vojon. Flôki alvenis en la regionon de Vatnajökull, la malpli loĝebla loko de la insulo : aluvoj, ŝtonoj, nefekundaj teroj, degeloriveroj malfacile traireblaj, aroj da glacirifoj. En printempo, li estis perdinta multajn bestojn ; malkuraĝigita, li ensipiĝas kaj forlasas la insulon, kiun li nomas : la Insulo de la glacioj : Islando.

Siavice Ingôlfur Arnason, proskribito de Norvegujo, vizitis Islandon. Poste, en 874, li tien ĉi revenas kun reĝoj, nobeloj, tutaj familioj, brutaroj. Laŭ la kutimo, li ĵetas en la maron, la pilierojn de la familia trono, kiujn la dioj kaj la ondoj scios demeti en lokon, kiu plej taŭgos por la instaliĝo de la elmigrintoj. Unue la navigistoj alvenis ĝuste tien, kien Flôki estis elŝipiĝinta. Ili nomas tiun lokon Ingôlfshofdi. Kelkajn jarojn pli poste, ili retrovas la pilierojn en la « Golfo de la Vaporoj ». Tie ĉi la koloniantoj instaliĝas. Estas Rejkjavik.

MISTERA FAMULO : GRAFO DE St-GERMAIN

La 18a jarcento, periodo de transiro, malordigo, kaj transformiĝo ne nur en Francujo, sed ankaŭ en la tuta Eŭropo, estigis esceptajn homojn, kiuj kontribuis je la transformo de la vizaĝo de l'mondo, kaj je la preparo de nia nuna civilizo. El tiuj homoj eminente elstaras enigma figuro fariĝinta legenda : Grafo de Saint-Germain (pr. : senĵermen). Laŭdata de iuj, malamata de aliaj, subite malaperanta sen postsignoj, senlaca migranto, perfekta nobelo, klerulo, poligloto, diplomato, muzikisto, pentristo, industriulo, mirakla resanigisto, Alkemiisto, profeto, ĉioscia erudito, posedanto de grandega kaj mistera fortuno, dotita de reala alloga ĉarmo, li ŝajnas iu Proteo, kies multaj aspektoj estas malsimilaj, eĉ foje kontraŭecaj ; li ja estis vivanta enigmo.

Multego da dokumentoj, memorlibroj kaj leteroj de samtempuloj, ŝtataj arkivoj, grandaj publikaj kaj privataj bibliotekoj estis traserĉataj kaj studataj de historiistoj kaj verkistoj. Ĉio tio ebligis konfirmon aŭ rivelon de iuj faktoj, sed neniel solvis la misteron de tiu eksterordinara vivo, tute ne klasigebla. La origino, naskiĝdato, mortodato, eĉ la nomo de grafo de Saint-Germain estas ankoraŭ nekonataj. Kompreneble, tre rapide formiĝis legendo pri tiu stranga individuo. Kelkaj aspektoj de tiu legendo montras lin kiel speco de duondio, nemortema. Aliaj — evidente misintencaj — rabtrompisto, ĉarlatano, senskrupula fripono.

Pro la mallongeco de tiu artikolo, mi unue mencios la ĉefajn historiajn faktojn nerefuteble pruvitaj, poste la legendon. La legantoj mem konkludu laŭ sia propra opinio.

ĈEFAJ HISTORIAJ FAKTOJ

Je la unuaj jardekoj de la 18a jarcento, Anglujo spertis veran internan militon inter la partianoj de la reganta reĝo, Georgo 2a, kaj la partianoj de pretendanto al la trono, Jakobo 3a el la Skota dinastio de la Stuart'oj. En 1743, Francujo decidinte apogi la Skoton (kiu estis edzo de fratino de la Franca Reĝo), militis kontraŭ Anglujo. En 1745, pro iuj malvenkoj, Georgo 2a timis, ke li devos fuĝi for de Londono. Tial, energiaj decidoj estis faritaj : oni arestis multajn suspektulojn, kaj ĉiujn alilandulojn loĝantajn en Londono. Inter tiuj neangloj troĝis « unu stranga homo konata laŭ la nomo grafo de Saint-Germain » loĝanta en la ĉefurbo depost du jaroj. Oni suspektis, ke li estas, ĉu spiono de la Franca reĝo, ĉu misiito de la Framasonoj. Tiu viro estis riĉega, kaj havis multajn rilatojn kun altrangaj Anglaj personoj. Pro tio, oni ne arestis, nek enkarcerigis lin, sed li estis gardita de policanoj en sia apartemento. Fine, li estis agnoskita senkulpa, kaj pri nenio riproĉinda. Malgraŭ lia stranga konduto, ĉar li absolute rifuzis respondi la demandaron pri identeco, asertante, ke li respondos nur al la reĝo mem. Kelkajn monatojn poste, en 1746, li delasis Anglujon, dirante, ke li reiras al Germanujo, kie li posedas grandajn bienojn. Dum dekdu jaroj, neniu aŭdis ion pri li. Laŭ ne konfirmitaj informoj, li dufoje vojaĝis al Hindujo.

*En 1758, li manifestiĝis en Parizo. Per letero al mar*kizo de Marigny (pr. : marinji'), frato de Sinjorino de Pompadour, favoratino de la reĝo, kaj « Direktoro de la Konstruaĵoj de la Reĝo », Saint-Germain petis, ke oni disponigu al li iun ejon, kie li povos instali fabrikon de tinkturaĵoj, kaj promesis, ke li allasos la profitojn de tiu industrio al la reĝo de Francujo. Apartemento kaj ejoj en la ĉevalejoj en la kastelo Chambord (pr. : Ŝambor') — tiam neokupata — estis disponigitaj al la grafo. Tie li instalis kemian (eble alkemian) laboratorion kaj laborejojn. Saint-Germain estis prezentita al la reĝo de Sinjorino de Pompadour. Ludoviko Dekkvina afable akceptis lin, kaj eĉ montris amikecon al li. Sed la necesaj ingrediencoj por la tinkturoj ne povis plu alveni el Germanujo. Tial, la grafo rezignas la industrion, kaj loĝas en Parizo. Li vizitadas la salonon de Sinjorino de Pompadour, kaj estas ofte akceptata de la reĝo. Ludoviko 15a tre ŝatis lin, kaj asertis, ke li estas naskiĝe alta nobelo. Iam grafino de Gergy (pr. : ĵerĵi') sepdek- jara oldulino, asertis, ke ŝi jam konis lin antaŭ 50 jaroj, en Venecio, kie ŝia edzo estis ambasadoro. La grafo ne kontraŭdiris, kaj nur respondis, ke li efektive ekkonis sinjorinon de Gergy **antaŭ tre longa tempo.**

Kompreneble, grafo de Saint-Germain ne havis nur amikojn. Li havis ankaŭ kelkajn malamikojn, pli malpli sin kaŝantaj, sed ĉiam pretaj malutili al li. Inter tiuj malamikoj, la plej potenca estis duko de Choiseul, tiama ministro pri Eksterlandaj Aferoj kaj Direktoro de la Reĝa poŝto. La intimeco inter la reĝo kaj la grafo ege malplaĉis al la duko. La milito kontraŭ Anglujo jam daŭris ekde tri jaroj (oni nomis ĝin, la Sepjara Milito). Ludoviko 15a tre deziris pacan traktaton. Choiseul konvinkita, ke estonto de Francujo dependas de malvenko de Anglujo, longigis la militon.

Por fini ĝin, la reĝo komisiis grafon de Saint-Germain, por ke li sekrete pritraktu pacajn kondiĉojn. Li sendis lin en Nederlando sub la malvera preteksto de monprunto al la Franca ŝtato. En Hago, Saint-Germain vizitis la Ambasadoron de Anglujo, Sir Jozefo Yorke, kiu estis unu el liaj amikoj. Tiu ĉi transsendis la peton pri pacaj kondiĉoj al Londono. Sed tiam la fama aventuristo Casanova estis en Hago. Li avertis la Francan ambasadoron, s-ro d'Affry, kaj sendigis leteron al S-ro de Choiseul, per kio li denuncis la grafon, asertante, ke li sekrete pritraktas monprunton, sen scio de la ministro kaj sen preciza mandato.

S-ro de Choiseul kaptis leterojn de la grafo al Sinjorino de Pompadour, kaj tiel sciiĝis pri la vera misio de Saint-Germain. Li ordonis al S-ro d'Affry, ke li arestu la grafon, kaj postulu lian ekstradicion. Feliĉe, Saint-Germain informiĝis pri la afero, kaj alfuĝis al Anglujo. Tio okazis en 1760.

Post kelkaj monatoj, Choiseul malfavoriĝis, kaj ne plu estis timinda. Grafo de Saint-Germain forlasis Anglujon : Oni trovis pruvojn, ke li tiam faris malgrandan vojaĝon en Rusujo en 1762. La postan jaron, li revenis en Nederlandon, aĉetis grandan bienon, kaj sub la nomo de Surmont, li instalis fabrikon por tinkturoj en la urbo Tournai (pr. : turnê'). Ĝi malsukcesis, kaj grafo de Saint-Germain denove malaperis.

Li reaperas en Germanujo post dekses jaroj. Ŝajnas, ke dum tiu periodo, li denove vojaĝis al Hindujo, kaj vivis inkognite en Italujo. Sed oni ne trovis pruvojn pri tiuj supozoj. En 1779, li estas gasto de Princo Karlo de Hesse, *kiu fariĝis unu el liaj disĉiploj. Li loĝas en la urbo Echen*förde, en Ŝlesvigo. Li okupiĝas per kemiaj kaj farmaciaj esploroj. Li nomigas sin S-ro de Weldone, angla vorto signifanta « bonfaranto ». Post longa malsano li mortas la 27an de februaro 1784. Oni enterigis lin en la preĝejo de Echenförde. Sur la paroĥa registro, troviĝas tiu men-

cio : « Tiu, kiu nomigis sin grafo de Saint-Germain kaj Weldone, pri kiu oni havas neniun alian informon, estis enterigita en tiu preĝejo... ».

LA LEGENDO

Kelkaj historiistoj erare atribuis al grafo de Saint-Germain iujn agojn dum lia unua restado en Francujo. Tio originas el stranga homonimo. Lia alveno al nia lando koincidis kun tiu de S-ro Claude-Louis (Klaŭdo-Ludoviko) de Saint-Germain, kiu estis feld-maršalo de la reĝo de Danlando, kaj revenis en Francujo por servadi en sia patrujo. Tie, li fariĝis ministro. Ambaŭ Saint-Germain vizitadis la salonon de S-ino de Pompadour, kie ili reciproke konis sin. Tio sendube kaŭzis la konfuzon inter la du viroj.

Multaj personoj kredis, ke Saint-Germain estas nemortema, kaj posedas la sekreton de longa vivo de la Rozkrucanoj... Li ja estas alkemiisto kaj eltrovis la « filozofian ŝtonon ». Tie kuŝas la mistero de lia fortunego, kies origino estas nekonebla. La policaj esploroj ordonitaj de S-ro de Choiseul tute malsukcesis. Grafo de Saint-Germain neniam asertis, ke li jam travivis plurajn jarcentojn, sed neniam firme kontraŭdiris tiun aserton. Iuj personoj tre sincere kredis, ke grafo de Saint-Germain tre bone konis Jesuon, ties familion kaj ĉirkaŭantaron. Laŭdire, li mem asertis tion kaj aliajn aferojn ne malpli fantastaj. Jen la realaj faktoj naskintaj tiujn klaĉojn :

Iuj misŝercantoj (laŭdire instigitaj de S-ro de Choiseul, sed sen definitivaj pruvoj) dungis unu aktoraĉon nomitan Gauve por ludi la rolon de Saint-Germain kaj misfamigi lin. Tiu aktoro iom similis la grafon, kaj scipovis imiti voĉojn. Ŝajne, la farso ne longe daŭris, sed ĝi sendube originis tiujn klaĉojn.

La naskiĝa dato kaj aĝo de la grafo de Saint-Germain neniam estis konataj. Laŭ tiuepokaj dokumentoj, li ŝajnis proksimume 45 aŭ 50-jara. Pri lia naskiĝo, oni proponis la datojn : 1690, 1698, aŭ 1700. Nenio povas konfirmi unu el tiuj datoj. Kie li naskiĝis ? Tio estas tute nekonata. Kiuj estis liaj gepatroj ? El ĉiuj proponitaj hipotezoj, nur du estas studindaj.

Laŭ unu, li estas la filo de princo de Transsilvanio, Francisko-Leopold de Rakoszi (1675 — 1735). Post malfeliĉa milito, tiu princo devis ekziliĝi en 1708. Lia juna filo estis konfidita al unu el la korteganoj, kiu fuĝis kun li. Sed neniam oni aŭdis pri la du fuĝintoj.

Laŭ la alia hipotezo, la patrino de Saint-Germain estas Maria-Anna de Neubourg (1607 — 1740), vidvino de la reĝo de Hispanujo Karlo 2a. Post ŝia vidviniĝo, ŝia konduto tute ne estis edifa. Karlo 2a mortinte en 1700, sen idoj, estiĝis du pretendantoj al la Hispana trono. Pro trudo de la Franca reĝo Ludoviko 14a, la reĝeco estis atribuita al duko de Anĵuo, kiu regis sub la nomo Filipo 5a. Maria-Anna, reĝino-vidvino estis forigita for de la kortego kaj fine ekzilita en Francujo. Tie ŝi longatempe vivis en Biarritz kaj Bayonne. Ĉar ŝi konservis sian fortunon, ŝi subtenis kvazaŭreĝan kortegon.

En 1733, ricevinte permeson reveni en Hispanujon, ŝi mortis tie post apenaŭ du jaroj. Ŝiaj amrilatoj kun ŝia financa ministro, iu judo nomita Atavara, de ŝi nobeligita, estis konataj de ĉiuj. Oni rakontis, ke ŝi havis de tiu amanto unu filon, kiu estis grafo de Saint-Germain. Alia pli verŝajna versio diras, ke la patro de la grafo estas grafo de Melzar, amiranto (ĉef-admiralo) de Hispanujo kaj ĉefministro de Filipo 5a. La amrilatoj inter Maria-Anna kaj grafo de Melzar estis publike konataj.

Tiuj hipotezoj estas bazitaj sur komparoj, kaj koincidoj, sed ne estas konfirmitaj de nerefuteblaj dokumentoj. Ĉiel, Sinjoro de Saint-Germain havis princan devenon. Princo de Transilvanio estis parenco de potencaj Germanaj kaj Aŭstriaj familioj. Maria-Anna de Neubourg apartenis al la Germana princa dinastio de Hesse, kaj estis vidvino de reĝo. Tio pravigas la aserton de reĝo Ludoviko 15a pri la alta nobeleco de grafo de Saint-Germain.

En la memorlibro de sinjorino d'Adhémar, amikino de la Franca reĝino Maria-Antonia, troviĝas rakontojn pri la provoj de grafo de Saint-Germain por averti kaj preventi la gereĝojn pri la minacantaj danĝeroj. La unuan fojon en 1775, kaj la lastan, nelonge antaŭ la aresto de gereĝoj en 1792, proksimume ok jarojn post la morto de la grafo registrita en Germanujo ! La gereĝoj malatentis liajn avertojn... Oni scias, kio okazis... Depost la morto de Saint-Germain, kelkaj personoj rakontis, ke ili renkontis lin en Parizo, en Vieno, kaj en aliaj lokoj. En 1945, Pariza ĵurnalo raportis pri lia ĉeesto sur la Franca Lazura marbordo. Kelkajn jarojn post lia morto, lia ĉerko estis elterigita. Ĝi estis malplena, kaj oni ne trovis spurojn de iu kadavro. Antaŭ nelonge, iu kantisto montriĝis sin je la Franca Televido nomante sin grafo de Saint-Germain. Sed tio ja ne sufiĉis por certigi sukceson al li, ĉar oni ne plu aŭdas pri li.

Grafo de Saint-Germain estis ja vivanta nekomprenebla enigmo ; kaj la mistero lin envolvanta estas daŭre nedeĉifrebla, kaj kredeble, neniam estos deĉifrita.

Eloi MOTILLON.

DU ANEKDOTOJ PRI GRAFO DE SAINT-GERMAIN

La olda Lakeo

Oni rakontis en la Parizaj salonoj, la jenan historion : Kardinalo de Rohan, sin turnante al tre maljuna servisto de grafo de Saint-Germain, demandis : « Ŝajnas iom nekredeble, ke via mastro jam vivis antaŭ du mil jaroj, kaj vidis Poncio-Pilaton. Ĉu vi tiam ĉeestis ? — Ho ne ! Sinjoro, respondis la lakeo, tio estas pli olda ol mi. Mi servas al Sinjoro Grafo, nur depost kvar cent jaroj ».

Kiel diras Itala proverbo : « Se ĝi ne estas vera, ĝi estas bone trovita ».

La diamanto de la reĝo

En la memorlibro de Sinjorino Du Hausset ĉambristino de la reĝino, troviĝas tiu rakonto :

« ... Kelkajn tagojn poste, interparolis la reĝo, Sinjorino (de Pompadour), kelkaj nobeloj kaj grafo de Saint-Germain, pri la sekreto per kio la grafo povas forigi la makulojn de la diamantoj. La reĝo alportigis al si mezdikan diamanton, kiu havis makulon. Li pesigis ĝin, kaj diris al la grafo : « ĝi estas taksita ses mil frankojn, sed ĝi multe pli valorus, se ĝi estus senmakula. Ĉu vi bonvolos gajnigi al mi kvar mil frankojn ? ». La grafo bone ekzamenis ĝin, kaj diris : « Tio estas ebla, kaj post unu monato, mi redonos ĝin al Via Reĝa Moŝto ». Post unu monato, li redonis la diamanton sen makulo : ĝi estis envolvita en asbesta tolo, kiun li deprenis.

La reĝo pesigis ĝin, ĝi estis sampeza, escepte tre etan diferencon. La reĝo sendis ĝin al sia juvelisto nenion dirante al li, per S-ro de Gontaut, kiu revenis, alportante naŭ mil ses cent frankojn, sed la reĝo reprenigis la diamanton, por ĝin konservi kiel kuriozaĵon. Li estis surprizegita, kaj diris, ke S-ro de Saint-Germain devas esti riĉa po milionoj, precipe se li posedas la sekreton fari dikain diamantojn el pluraj maldikaj. La grafo diris nek jes, nek ne... ».

Tiu anekdoto estas sendube aŭtentika. Sinjorino du Hausset skribis pro propra plezuro, kaj neniam pensis, ke ŝia notlibro estos iam publikigita. Kaj ŝi ne povus imagi tian historion, kiu cetere, estas konfirmita de aliaj dokumentoj.

E. MOTILLON.

Istvan Orkény : DEKTRI

Terura varmego regis urbon Komârom. (Nun Komarno en Slovakio). La surfaco de la Danubo brulegis kaj fumis kaj surstrate la varma aero tiel gluiĝis al la muroj kiel la panpasto en knedujo. La sinjoroj ŝvitis, ŝanceliĝis, kaj envieme palpebrumis al la sableca bordo, kie du ciganidoj refreŝiĝis inter la bubaloj. La skribisto, irante antaŭ ili, fine haltis antaŭ domo.

— Li loĝas ĉi tie. — li diris.

La pordego de la palisaro malagrable grincis, en la korto senmove staris kelkaj sunfloroj kun kapoj pendantaj. Ankaŭ unu rubusarbo staris spiregante kiel soifanta hundo, malantaŭ la puto, sed ĝia ombro ne estis pli granda ol mia manplato. Kiam la sinjoroj paŝis en la ĉambron, ili malpeziĝis. Per malfermita buŝo ili glutis la aeron, kiel la ezokoj. En la lito la malsanulo sidleviĝis.

— Bonan tagon sinjoraj moŝtoj — li diris respekteme kaj ĝustigis sian hararon malantaŭ la orelo. Li estis alta, magra, dikosta, variolcikatra viro, la aknoza Sebö, la urba ekzekutisto.

La kalva sinjoro frotis siajn okulojn ; ili jukis pro la varmo.

— Ĉu vi estas ankoraŭ malsana, Sebö ? — demandis Mârton Môri, la blankbarbulo. Li ne demetis sian ĉapelon. Kial demeti ĝin ? Liaj sep ŝipoj naĝas sur la Danubo ; antaŭ pasintjare, post la incendio, la imperiestro skribis al li leteron. Pergamenleteron, kun kvar karmazinaj sigeloj.

— Jes, malsana — ĝemis la ekzekutisto. — Jam de tri semajnoj.

— Precize de dudek kvin tagoj.

— Jes.

— Ĉu via koro ?

— Jes. Kaj ankaŭ mia reno.

— Kvankam estus laboro por vi.

— Kiomope ili estas ?

— Dekdu.

La ekzekutisto suspiris. Kion fari, se li estas malsana.

— La magistrato urĝas nin, Sebö. Kio do estas ?

La mortkondamna ĉelo estas plena kaj ĝi multekostas. Ĉu vi resaniĝos baldaŭ ?

— Mi ? Mi neniam. Sinjoraj moŝtoj, mi mortos.

La sinjoroj alrigardis unu la alian.

— Vi mortos, ĉu vi diras tion ?

— Jes, tre baldaŭ.

Nu. Oni kredus ke la ekzekutisto havas sigelitan kontrakton kun la morto. Ili ne ĝenas unu la alian.

— Kiel vi scias ?

— Mi sentas, mia sinjoro.

Mârton Môri sulkis sian frunton. Li meditis, poste tamen li demetis sian ĉapelon de sur sia kapo.

— Se vi statas tiel, kion ni povas fari nun ? — li murmuretis bonvole. Kiam vi sentos alproksimiĝi vian lastan horon, sendu tuj al mi vian filon, kaj mi sendos la pastron... Mi ne volas ke vi mortu, kiel la lupoj. Ĉu bone ?

— Tre bone — ĝojis Sebö. Kaj mi dankas vin por via boneco.

Kiam ili estis ekstere trans la sojlo, kvazaŭ ili estus paŝintaj inter flamojn.

— Kaj nun... ? — demandis la skribistro.

La sinjoroj pensadis. Kaj nun ..... ni venigos Sztrhacsek.

— Kiu estas tiu ? — haltis Mârton Môri.

— La ekzekutisto en urbo Esztergom.

— Kaj vi, mia amiko — diris la kalvulo al la skribisto, — vi skribos dece al li la leteron.

— Jes.

— Hodiaŭ estas jaŭdo. Vendredo, sabato, dimanĉo...

Dimanĉe ĉe la tagiĝo la ĉaro estos tie por li. Tagmeze li povos alveni jam ĉi tien.

— Ĉi tien.

— La prezon vi marĉandu kun li ; ĉu vi komprenas ? Helpisto ne venu kun li. Tiun laboron faros la helpisto de Sebö.

— Bone. — kapjesis la du aliaj.

— La magistrato de Komârom estis fama pri la ŝparemo. Tiel oni rakontis en la departemento ke la noktgardistoj devas forblovi la lanternojn en la stratoj, kiam la noktoj estas lunlumaj ; sed la loĝantoj de Komâron hontis pri la afero kaj ili diris ke ne la noktgardistoj estingas la lanternojn, sed la vento... Neniu kredis ĉi tion kvankam estis vere. Nome en Komârom tute ne estis noktgardisto. La magistrato domaĝis la monon.

Oni esperis ke la vetero ŝanĝiĝos. Kontraŭe la varmego plifortiĝis. Vendrede, sabate plivarmiĝis, dimanĉe la ovo jam kuiriĝis en la sablo, la prunoj sur la arboj krevis, la ĉevaloj febre skuadis la kolbridon kaj sur la strato Kispolgâr ili piedbatis la ventron de la edzino de la mielkuk-vendisto.

Tamen sur la ekzekutejo, sur la bordo de la Et-Danubo kunvenis ĉ. kvincent gapuloj ; tutnombre ĉeestis la urba magistrato, estis tie la ĉefjuĝisto, la prokuroro kaj Ciprian, la abato. Poste defilis la gardistaro kaj alkondukis la malliberulojn, postdorse kunligitaj manoj, la nuko de ĉiuj estis razita, laŭnombre dekdu. La homamaso, densa kaj aĉa ĝuege kalkulis : dekdu dektri ... Tute ne ! Nur dekdu ! Cetere nombru ilin la diablo en ĉi tiu somera varmego ... kaj nenie troviĝas guto da akvo !

Nenie troviĝas guto da akvo kaj eta ombro, eĉ ne tiel granda, kiel avelo. Kie en la infero vagabondas tiu Strhacsek ? Kial li ne venas jam ? Li promesis esti ĉi tie tagmeze kaj nun estas la tria postagmeze. Unu virino svenis. La magistrataj sinjoroj blasfemadis kaj la ĉefjuĝisto sendis serviston en la urbon kaj portigis unu barelon da akvo. Oni trinkis ĝin dummomente, kaj la malliberuloj tute ne ricevis el ĝi. Kial ili bezonus tion ? Post duonhoro, unu horo — foje tamen alvenos tiu aĉa ekzekutisto kaj tiam li senkapigos ilin.

Sed Szedlâk, la multparola Szedlâk laŭte indignis. Li mortigis sian patron, sufokis sian edzinon, ekbruligis la domon, kie troviĝis liaj filoj — estas vere, ke oni senkapigos lin pro tio, sed kial oni ne donas al li akvon ?

— Ĝi ne estis sufiĉa — klarigis Stéhammer, la dika forĝisto. Li estis milda, eĉ unu kulon li ne povus mortbati ; li neniam levis manon por bati iun. La milda Stéhammer faris ormonerojn de dudek forintoj — el bonkvalita alojo, — eĉ Dio ne povis distingi ilin de la veraj ormoneroj. Sed Stéhammer faris la nazon de la imperiestro Leopoldo iomete kuspita kaj oni tuj rimarkis tion dirante : « La nazo de la imperiestro ne estas tia... ». Tial Stéhammer trafis ĉi tien ; la forĝisto estis pacienca, dume la aliaj laŭtvoĉe plendmurmuris. Nature Szedlâk estis la plej laŭta, sed tiu ruĝa slovako, kiu piedbatis en la lumbon de la fortikaĵestro de Fülek okaze de ia proceso, same grumblis.

— Ĉu okazos jam io ? — kriis la slovako. Ĉu venos tiu ekzekutisto aŭ ne venos ?

Tiam ankaŭ la aliaj kuraĝiĝis, muĝis, interpuŝadis, dirante ke ĉi tiu varmego estas pli malbona ol la morto, oni ne igu ilin amuzaĵo, sed venigu la ekzekutiston, eĉ el sub la tero kaj ek ! La bruego pliiĝis, fine la ĉefjuĝisto enuis kaj signis permane al la kapitano de la gardistaro :

— Pâpai, faru ordon !

Sed ankaŭ Pâpai ne kapablis fari ordon, ĉar la malliberuloj jam tute elĉerpiĝis pro la varmo, kaj ilia maltrankvilo infektis ankaŭ la spektantojn. Ĉi tiu aĉa amaso eksentis ion.

Ili komencis hurli, estas honte, tiuj homoj havas la rajton esti ekzekutitaj kaj insultemajn vortojn kriis pri la magistrato. La sinjoroj iĝis nervozaj, cerbumadis kaj pri tio ili interkonsilis, kiel eblus senrimarke venigi el la urbo taĉmenton, sed bonŝance ĉi tio jam ne estis necese, ĉar Pêter, la helpisto ĵetis krion :

— Pacon, homoj ! Tie venas Strhacsek !

Ĉiuj malpeziĝante ĝemspiris kaj Szedlâk, viŝante perkubute la ŝviton de sia vizaĝo, kvietiĝante murmuris : « Nu, dank' al Dio ! » Kaj ĉiu rigardis direkte al Ujfalu kaj atendis la ekzekutiston kaj ĉiu ĝojis.

El la direkto de Ujfalu la pramo malrapide naĝis sur la Danubo, sur la pramo staris la ĉaraĉo kaj en la ĉaraĉo estis la ekzekutisto ; kaj sur la ŝultro de la ekzekutisto troviĝis la hakilo, sur kiu de tempo al tempo ekbrilegis la suno kun blindiga lumo, pro kio oni sentis frostotremon trakuradi sur la dorso. La pramo albordiĝis kaj la ĉaraĉo malrapide venis supren silente, kvazaŭ flosante sur la varmaj ondoj de la aero.

Tiel alvenis Strhacsek, grasa kaj diktrunka viro, pri kiu jam lia voĉo malkaŝis, ke li en ĉi tiu mondo nur la bieron ŝatas. Li haltis antaŭ la ĉefjuĝisto kaj klinis sin ; la juĝisto laŭtlegis longan skribaĵon, unue latine poste hungare ordonante ke la verdikto estu ekzekutata sur la dekdu kulpuloj. Poste defilis la malliberuloj, unue Szedlâk, post li Stéhammer, poste la ruĝa slovako, post tiu Pintêr, Gâl, Fodor kaj la ceteraj. Strhacsek nombris ilin, poste li faligis la hakilon sur la ŝtipon kaj deklaris ke ili ne estas dekdu, sed dektri, pli ol estis skribite en la letero. Li — diris Strhacsek — tute ne estas freneza.

Tiam denove antaŭenpaŝis la ĉefjuĝisto kaj nombris la malliberulojn. Unu, du tri kaj tiel plu, kaj komunikis ke ili estas precize unu dekduo.

Strhacsek eble enkalkulis ankaŭ Pêter, sed lin senkapigi estas superflue, estante tiu lia helpisto, eĉ..... Tiam Strhacsek envicigis la malliberulojn kaj nombris ilin tiamaniere, ke li ekpuŝis per la pinto de la hakilo ĉies flankon. Unu, du, tri, kvar.... Mi petas, ili estas dektri, ne kalkulante la helpiston, ankaŭ la blindulo povas vidi, ke ili estas je unu pli. Li ne komprenas la sinjorojn, kial ili volas mokadi pri li, kiu pekis al neniu kaj li ĵuris je la Sankta Virgulino, ke li ne laboros pli, nur tiom, kiom li per subskribo surprenis. La diablo prenu la tuton !

Kion fari, la prokuroro elprenis la nomliston kaj laŭtlegis ĝin. Tiel retroviĝis la superfluaĵo, la dektria, kiun oni tuj flankenstarigis. Malkovriĝis, ke iu certa Mikô, el Ŭrgepuszta, fuĝinta servutulo erare estas ĉi tie, kaj lia puno estas nur kvindek bastonbatoj kaj kvar ormoneroj ; sekve Péter piedfrapis lian postaĵon kaj kriis al li iri en la inferon. Poste li ĝustigis la kapon de Szedlâk sur la ŝtipo, abato Ciprian alten levis la krucon kaj en la manoj de Sztrhacsek fajfante defrapis la hakilo.

Mikô forŝteliĝis kaj haltis flanke. Li rigardis la ekzekutiston, kiel rapide, senerare kaj ritme li laboras ; li havas dibenitajn manojn.

Kiam Fodor sekvis, li ŝteliĝis pli proksimen kaj atentis. Iomete li hontis ke oni lin forpelis, iomete li ĉagreniĝis. Li sentis ke li apartenas al ili ; de semajnoj li sidis kune kun ili en la karcero, li suferis kun ili tie kaj kun ili li sekiĝis nun en la varmego... Kio atendos lin ? Kvindek bastonbatoj, monpuno, laborego por la sinjora moŝto, dekonaĵo, naŭonaĵo. Post senĝojaj tagoj, baraktado kaj mizero, unu tagon li mortaĉos ĉi tiel aŭ tiel. Kaj ĉi tiu Strhacsek bonege laboras. Nun venis la vico de Stéhammer, la naŭa, la deka estis la ruĝhara slovako, la dekunua Pintér kaj la lasta estis Gâl... Li sekvis ties paŝojn.

La manoj de la ekzekutisto estis rapidmovaj, kiel draŝilo ; li ne suspektis kaj ankaŭ la ĉeestantoj ne suspektis, tiu aĉa densa amaso ; sed la sinjoroj vidis tion kaj ili plezure ridetis sub la lipharoj. Eble ankaŭ Mikô ridetis, vidante la ruzon de la sinjoroj, kiel ili nun trompas la ekzekutiston. Rigardu ĉi tiun bovon — pensis Mikô — li ne rimarkas ion ! Kaj li tutkore ĝojis pri la facila liberiĝo.

El hungara :

d-ro Istvân Nagy

LA II-a LETERO DE MIHAI EMINESKU

EL RUMANA LINGVO — tradukis PETRO TEODORESKU

Kial mia plumo restas en la inko, demand via ?
Kial min la ritm'ne logas de labor'per tento sia ?
Kial dormas kolektitaj inter la flavaj folioj,
Jamboj trokeoj, rimoj, la saltantaj dektiloj ?
Se vi scius la problemon de ĉi vivo baraktanta,
Vidus vi ke ja mi rajtus eĉ la plum'estu rompanta.
Jen demand'kial komencu provi per batal'kruela
Fandi en la formo novan lingvon saĝa kaj tre bela ?
Tiu kaŝa sentimento kiu dormas en harp'via,
En teatraĵoj vi disvendu kiel komercaĵo ia ?
Kiam soife vi serĉas la form' de plej bela enhavo,
Skribu vi, laŭ la postuloj, ia histori, sur akvo ? —
Certe vi, al mi respondos, ke pli bone en la mondo
Estas ke mi penetrigu mian nomon kiel ondo,
Atentigu mi la virojn el la lando per kontemplo,
Mi dediĉu miajn versojn al virinoj, de ekzemplo,
Kaj l'amar de l'anim'mia mi forigu per la menso ; —
Antaŭiris ja aliaj tiun vojon kun intenso ;
En nia jarcent'ekzistas tia stranga spec da bardoj,
Kiuj provas per poemoj jam fariĝi reĝ'bastardoj,
Dediĉas poem'iliaj al granduloj, al virinoj,
Kantas ilin en kafejoj kaj bruadas en salonoj ;
Ĉar vojetoj de la vivo pezaj kaj mallarĝaj estas,
Ili provas ĝin trapasi nur se la virinoj helpas,
Donacas ili broŝuroj, al edzinoj, kies edzoj laŭ esperoj
Ministroj fariĝante iam, zorgos pri iaj aferoj. —

Kial por mi mem ne volas, por la glor'estu poeto ?
Ĉu ja gloro povas esti paroladi en dezerto ?
Nun, kiam al propraj pasioj ĉiuj homoj fide sklavas,
La glor'estas fantazio kiun miloj ŝajne havas
Ilian idol'adoras grandnomante homet'iu
Kiu estas sapveziko en jarcento de neniu.

Ĉu agordu mian liron, glori amon per amkantoj ?
Kiu frate dividiĝas inter du kaj tri amantoj ?
Balbutu mi sur dolĉa kordo ke memvole mi decidas
Aparteni al la ĥoro kiun Menelao, kvidas ?
Nune ofte la virino, kiel mond', lernejo estas,
Kie ja nur malestimo kaj dolor la viroj spertas.
La famajn akademiojn de sciencoj pri virinoj,
Pli kaj pli ofte vizitas avidece la junuloj,
Pli kaj pli junaj lernantoj, la virinoj jam akceptos,
Ĝis kiam el tuta lernejo certe nur ruinoj restos.

Ve ! ĉu vi eĉ plue pensas al akademiaj horoj,
Kiam pri la tempo paso paroladis profesoroj ?
La kadavroj de momentoj en volumoj kolektante
En ĉifonoj de la aĵoj ili la saĝec serĉante ?
Per iliaj mildmurmuroj, fonto ja de horum-harum,
Gajninte per murmurado, nervum rerum ĝerendarum ;
Per profund'piec'iliaj nia mens'turniĝis tuj
Luligante ĉu planedon, ĉu la Reĝ'de Egiptuj.

Ŝajnige vidas l'astronomo kun ripozo mallumanta,
Facile kiel de skatolo, el haos'la mond'tiranta.
Li la eternan mallumon etendiĝas kaj nin lernas
Ke, same perloj sur ŝnuro, la epokoj oni ĉenas.
Tiam la mond'en la kapo kvazaŭ muelil'tuniĝas
Ke sam' Galileo ni sentis Kiel la tero moviĝas. —

Ebriaj pro mortaj lingvoj, pro plandedoj, lernej polvo,
Komparis ni profesoron kun la problemar'sen solvo.
Rigardont'araneaĵon sur plafono sur la muroj,
Aŭskultis ni pri Ramseso sed sonĝis pri bluokuloj
Kaj sur la kajeraj randoj skribis dolĉaj versoj ni
Al knabino rozvizaĝa kiu nomiĝas Lili.
Antaŭ ni estis ondanta kun la tempo en miksaĵo
Ia suno, ia reĝo, ia besto, ia aĵo.

La brueto de skribiloj, ĉarma estis en silento
Image vidis ni arbegon kies branĉoj movas vento,
La kap'peza benkon frapis ĉion ŝajnis en senfin' ;
Kiam sonis sonorilon, Ramses'ne plu tedis nin.

Tiam la pensita mondo por ni estis ja vivanta,
Do reala al ni ŝajnis eĉ tute neekzistanta.
Vidas ni jam nur hodiaŭ kia dorna, vaga vojo
Kia maltrafa ĝi estis kore sopirata ĝojo ;
Kaj en la komuna mondo, ne devas esti revinda,
Ĉar se vi hazarde revas, vi fariĝas nur ridinda.

Tial do, de nun komence, ne plu estu demand'via
Kial ritmo min ne logas de labor'per tento sia,
Kial dormas kolektitaj inter la flavaj folioj,
Jamboj, trokeoj, rimoj, la saltantaj daktiloj...
Se mi obstinos versigi, timas mi ke la sukceso
Iĝos homojn min laŭdi Senpripenso kaj senĉeso.
Se mi portas la malamon eĉ ridete kaj plezure,
Iliaj laŭdoj certe min ĉagrenus sen mezure.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬAJ PROLEMOJ

Inter Liverpulo kaj Novjorko

Se ni supozas, ke ŝipo A forveturas el Liverpulo la 10an de Majo, ĝi jam tuj post sia forveturo renkontas tiun ŝipon, kiu Novjorkon forlasis la 2an de Majo. Kaj la lasta renkontata ŝipo estas tiu, kiu forlasas Novjorkon la 18an de Majo. Ĉar ĉiutage unu ŝipo forlasis Novjorkon kaj venis renkonte al ŝipo A, estas evidente, ke ŝipo A renkontis 17 ŝipojn.

Trovu la frazon

La trovotaj vortoj estis : Afriko, Ĉokolado, Rapide, Elefanto, Vespero, Esperanto, Vino, Silenti, Sekundo, Vivas, Tago, Gasto, Kvin, Tiu.

Reordigante la literojn laŭ la nombroj de 1 ĝis 70, oni povis trovi la jenan frazon :

Se vi volas esti perfekta esperantisto, vi devas ĉiutage fari praktikon en la lingvo.

Ĉu vi bone kalkulas ?

$$2 = \frac{4 + 4}{4} + 4 - 4$$

$$3 = 4 - \frac{44}{44}$$

$$4 = \frac{4 + 4 + 4 + 4}{4}$$

$$5 = \frac{4}{4} + 4 + (4 - 4)$$

$$6 = 4 + \frac{4}{4} + \frac{4}{4}$$

$$7 = 4 + \frac{4 + 4 + 4}{4}$$

$$8 = 4 + 4 + \frac{4 - 4}{4}$$

$$9 = \frac{4 + (4 \times 4)}{4} + 4$$

$$10 = 4 + 4 + \frac{4 + 4}{4}$$

$$11 = \frac{44}{4} + (4 - 4)$$

$$12 = 4 \times \frac{4 + 4 + 4}{4}$$

$$13 = \frac{4}{4} + 4 + 4 + 4$$

$$14 = \frac{44 - 4}{4} + 4$$

$$15 = \frac{44 + (4 \times 4)}{4}$$

NOVAJ PROBLEMOJ

La urbestro kaj la policisto

La urbestro kaj la policisto de iu vilaĝo promenas sur la stratoj kaj renkontas tri personojn.

— « Strange, diras la policisto, la sumo de la aĝoj de tiuj personoj egalas la duoblon de via aĝo kaj la produto de iliaj aĝoj estas 2450... Ĉu vi povas diri al mi la aĝon de tiuj personoj ? »

Pripensinte la urbestro respondas :

— « Ne »

— « Sciu do, diras la policisto, ke mi estas pli aĝa ol la plej aĝa el tiuj personoj ».

Kaj la urbestro trovas la aĝojn.

Demandoj :

Kiom aĝaj estas la tri personoj ?

Kiom aĝaj estas la urbestro kaj la policisto ?

Enigmo

1) — Laŭ la sekvantaj difinoj, trovu 16 vortojn (inter krampoj, la ciferoj indikas la nombron da literoj de tiuj-ĉi 16 vortoj).

2) — Al ĉiu vorto trovita, almetu unu plian literon, ĉiam en la saman lokon, t.e. la antaŭlastan : tiel devas estiĝi novaj esperanto-vortoj.

La legado, en ordo de sinsekvo, de la 16 literoj aldonitaj, prezentos la trovotan maksimon.

1 — Ekstera krusto de arba trunko (4)

2 — Parto de homa membro (4)

3 — Aro da du objektoj aŭ estuloj (4)

4 — Saltanta insekto (4)

5 — Senlima daŭrado (5)

6 — Natria klorido (4)

7 — Ekstrema flanko de nazo (3)

8 — Aperturo en tegmento (4)

9 — Konifera arbo (4)

10 — Granda, ornama floro (5)

11 — Ĝi ofte okazas dum la dormado (4)

12 — Intermonta malalta vastaĵo (4)

13 — Peruvia remaĉulo (4)

14 — Senvosta amfibia besteto (4)

15 — Ĉambrego (4)

16 — Sovaĝa eŭropa bovo (3)

GRAMATIKO PER BONHUMORO

ĈI

Ĉi

Adverbo, esprimas proksimecon en spaco aŭ tempo :

— ĝi estas uzata Antaŭ aŭ Post montraj adjektivoj, pronomoj aŭ adverboj : ĉi tiuj ; tie ĉi ; ĉio tio ĉi.

— ĝi montras :

la laste nomitan personon, la plej proksiman aferon :

kiun libron vi volas ? ĉi tiun aŭ tiun ?

ĝi akcentas la priparolitan aferon :

tion ĉi li diris = jen kion li diris.

UZO DE STREKETO

NE :

kun la demonstrativoj :

tiun ĉi historio ; li loĝis tie ĉi ;

JES :

kun la derivitaj E-adverboj :


ĉi-matene ; ĉi-rilate ; ĉi-loke ;

RIM :

ĉi estas kelkfoje uzata kun substantivo :

fama estis ĉi homo.

Vidpunkto



— Kredu min, karulo, mi ege ĝojas, ke ĉi-jare ni havas tiom da neĝo por akcepti niajn amikojn okaze de Kristnasko. Estas tre taŭga vetero por tiu festo ; ĉu ne ?

Interkonsento



— Konsentite paĉjo, mi bonvole akceptos la fratineton ; sed, verdire ŝi estos ludilo precipe por panjo ; ĉi-okaze, dank'al la asekur-pago, vi povos aĉeti por mi biciklon.



Deziroj kaj esperoj



— Ke tiu ĉi Nova Jaro alportu al ĉiuj niaj amikoj bonan sanon, feliĉajn tagojn, sukceson en iliaj entreprenoj, ĉion bonan, kaj agrablan restadon en nia Esperantujo.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (3 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (430 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (4000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Jones R. Kent, 3318 N. Lake Shore Drive, n° 801, CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 5 de 1977, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Les volets sont clos. Ils se sont refermés sur des salles vidées de ceux qui les avaient animées. Ils ont été nombreux ceux qui ont consacré tout ou partie de leurs vacances à un séjour à Grésillon. La participation aux trois périodes a été plus équilibrée que de coutume, l'écart habituel entre le nombre de stagiaires de juillet et celui du mois d'août ayant été réduit cette année. Le résultat financier sera donc comparable sans doute à celui de l'an dernier. Sur ce plan nous avons tout lieu de nous réjouir. La célébration du 25e anniversaire à chaque période a été familiale, à la fois émouvante et gaie, en tout cas réussie.

Et sur le plan culturel ? Le nombre des personnes qui ont suivi les activités proprement espérantistes (cours, conférences) n'a pas été ce que nous souhaitions, ce qui est décevant pour les organisateurs, les responsables de cours, les conférenciers. Les activités manuelles semblent pour certains l'emporter sur les cours et les conférences. Peu importe si les échanges dans ce domaine se font également en esperanto. Des stagiaires semblent montrer une préférence pour les « activités-vacances ». Qu'importe si ce faisant ils ne se mettent pas en marge de la collectivité ; si, désirant profiter de congés parfois très courts, ils ont choisi de les passer dans un milieu espérantiste pour y pratiquer la langue. A certains stages des gens passent quelques jours à n'importe quel moment, s'en vont remplacés par d'autres ; cela est très gênant pour le déroulement des cours en particulier. Faut-il rédiger un règlement pour tenter de résoudre tous ces problèmes ? La question est posée et sera discutée à la prochaine réunion du Conseil d'Administration. Il faudra à cette occasion préparer les élections qui auront lieu en 1978. Selon les statuts six sièges seront à pourvoir. Il serait bon qu'avant le 31 décembre de nouvelles candidatures soient enregistrées. Il serait bon qu'un sang jeune vienne renforcer l'organisme directeur de la Maison. Tout possesseur d'au moins une action peut être candidat. J'attends vos propositions.

P. BABIN.

INTER NI

Ĉijare la nombro da partoprenantoj en la tri someraj periodoj estis pli ekvilibra ol la pasintajn jarojn. La financaj rezultoj estos verŝajne kontentigaj. La 25-a datreveno de la malfermo de Gresillon al la esperanto-mondo estis celebrita en familia etoso samtempe kortuŝe kaj gaje.

Nun pri la kultura flanko. Ne kontentige estis la nombro da ĉeestantoj en la pure esperantaj aktivaĵoj. La man-aktivaĵoj ŝajnis al kelkaj tro konkurencaj. Iuj ĉeestantoj preferis la « feriajn aktivaĵojn ». Kompreneble ne tro gravas kiam eskter la kursoj oni daŭre aŭ ankaŭ praktikas la lingvon kun la aliaj ĉeestantoj. Pli ĝene estas, kiam vizitantoj venas kelkajn tagojn, meze de periodo kaj foriras antaŭ ol ili povis adaptiĝi. Ĉu estas necese fari specon de reglamento por provi plibonigi la sistemon ? La demando estas farita. La problemo estos diskutata de la konsilio.

En 1978 ses konsilianaj postenoj estos renovigitaj. Tiuokaze ni atendas la kandaditiĝon de gejunuloj.

LA REVUE

L'été est passé, la fin de l'année arrive. C'est le moment pour ceux qui ne l'auraient encore pas fait de se mettre en règle pour leur abonnement 1977. Il n'est pas trop tôt pour régler l'abonnement 1978. Je vous rappelle que nous sommes prêts à envoyer à ceux de vos amis dont vous nous transmettrez l'adresse un numéro de Kulturaj Kajeroj afin de leur faire connaitre votre revue.

NOS JOIES

Nous avons appris avec beaucoup de plaisir que M. et Mme Babin, étaient grand-parents pour la 2e fois.

Tous nos vœux à Anne-Laure, et nos félicitions aux grands-parents, et aussi aux parents Dominique et Nicole Babin.

NOS PEINES

Nous avons appris le décès de M. Curnelle, de Lambenart. A madame Curnelle, qui, avec son mari s'est occupée à une certaine époque de la gestion de stages à Grésillon, nous faisons part de notre vive sympathie.

ABONNEMENT BIENFAITEURS (suite)

Y. Guerout (94)	30
G. Treanton (22)	100
G. Parizot (06)	30
H. van Roye (Belg.)	30
J. Simonet (47)	30
C. Vanbierviliet (Belg.)	60
M. Bossard (44)	30
P. Bascou (07)	30
N. Bakker (Pays-Bas)	30
J. Duran (10)	30
M. Guyot (Belg.)	30
E. Perseke (All. Féd.)	60
R. Lenel (22)	30
H. Schutt (All. Féd.)	100
E. Eggers (All. Féd.)	100
I. Plazotta (Autr.)	30
R. de Schepper (Belg.)	30
J. Lahaye (10)	30
Y. Martinot (10)	60
H. Benaim (47)	30
F. Le Magadure (56)	30
F. Maury (69)	30
J. Rigal (27)	30
Y. Chevet (93)	30
C. Norga (Belg.)	30
P. Bourdon (59)	30
L. Beets (Belg.)	30
H. Jouve (38)	30
A. Roux (94)	30
N. Antoine (10)	30
C. Mounier (30)	30
G. Daniel (91)	30
R. Lloancy (64)	30
R. Bastong (78)	30
JP. Vilhelm (59)	60
J. Guillaume (78)	30
A. Ribot (47)	30
G. Lecomte (49)	30
P. Askolovitch (75)	30
J. Cavelan (91)	50
A. Correia (Port.)	30
M. Haudebine (75)	30
P. Jacquesson (75)	30
D. Vergnac (47)	30
N. Mouneyrou (47)	30
J. Turbillon (37)	30
S. Brezinski (61)	30
R. Coquin (11)	30
Total :	**1790**

Conseil d'administration du 3 Juillet 1977

La séance est ouverte à 10 heures par M. Babin.

Etaient présents : Mesdames et Messieurs Babin, Bodereau, Bénistant, Boyer, Cheverry, Dairon, Lemagadure, Métivier, Micard.

Activité depuis l'Assemblée Générale :

Plusieurs stages se sont déroulés au cours du printemps :

Une rencontre de professeurs de mathématiques réunis par M. Clopeau.

En même temps, se déroulait un stage Delaire réunissant 15 personnes. La cohabitation des deux stages n'a pas posé de problème particulier.

La rencontre fédérale du 19 mai a réuni 62 personnes.

A la Pentecôte, le stage des Universités Populaires n'a réuni que 40 participants cette année.

Du 19 au 26 juin, 37 esperantistes du Groupe Jean ont suivi des cours avec assiduité.

STAGES D'ETE :

Première période :

Administration M. et Mme Babin. Il y a plus de 100 inscrits. Il y aura de nombreuses allées et venues de participants. En particulier passeront 65 à 70 étrangers et plus de 30 jeunes de 12 à 22 ans.

Un nouveau type de cours sera expérimenté, qui tiendra compte du niveau de chaque élève. Celui-ci continuera l'étude de l'Esperanto avec ses manuels habituels.

Un cours pour enfants pourra être organisé en fonction des besoins. Conférences aux sujets très diversifiés.

Des excursions seront organisées en fonction des vœux des partitipants.

Activités de reliure et de vannerie.

Deuxième période :

Administration M. et Mme Dairon.

Le nombre d'inscrits est également plus important que d'habitude : 70 personnes déjà.

Le cours 1er degré sera dirigé par Mme Childs-Mee par la méthode directe.

Le 2e cours sera dirigé par M. Boyet, sous la même forme expérimentale que pendant le premier stage.

M. Vilhelm dirigera le cours 3e degré.

Activités de reliure et de vannerie.

Troisième période :

Le nombre de participants sera également important.

Cours : 1er degré : dirigé par M. Parisot,

Cours : 2e degré dirigé par M. Boyet selon la même méthode que pour les stages précédants.

Cours : 3e degré dirigé par M. Ribot.

Activités de reliure et de vannerie.

Dans l'ensemble la saison s'annonce bonne, et le nombre des inscriptions dépasse largement la moyenne habituelle.

QUESTIONS DIVERSES :

Travaux :

5 chambres ont été restaurées par une équipe de bénévoles, mais il n'a pas été possible de terminer les tapisseries du couloir du 1er étage et de l'escalier menant au 2e.

Achats :

Des arbustes seront plantés grâce à un don du groupe Jean (stage de la fin Juin).

Un projecteur pour diapositives a été acheté récemment

25e ANNIVERSAIRE DE LA NAISSANCE DE LA M.C.E. :

Au cours du 1er stage, une journée lui sera consacrée avec causerie le matin sur Grésillon, et exposition évocation des souvenirs des participants qui ont fréquenté les premiers stages au cours de la soirée.

Chaque stage verra une journée consacrée à ce sujet sous des formes qui pourront être un peu différentes.

Mme Micard demande que les anciens membres du Conseil d'Administration soient informés des dates de ces différentes manifestations, afin qu'ils puissent y assister s'ils le désirent.

L'ordre du jour étant épuisé, M. Babin lève la séance à 12 heures.

Le secrétaire de séance
Guy DAIRON.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :	
noires :	0,60 F.
couleur :	0,80 F.
Cuillères de collection :	13,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin

Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

Quelques livres d'Edmond Privat

Vivo de Zamenhof (14 frs)
Aventuroj de pioniro (14 frs)
Junaĝa verkaro (14 frs)
Karlo (5 frs)
Vivo de Grandhi (20 frs)